

ESPERO



I.K.U.E.

KATOLIKA

Decembro 1953 – No. 431 – Jarkolekto 50

ESPERO KATOLIKA

Fondita de Pastro Emile Peltier, Tours (Francujo) en 1903.

Oficiala Organo de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
. fondita de Pastro Richardson en 1910 en Parizo.

Prezidanto: sac. A. Beckers, Kanaalstraat 9, Overpelt-Fabriek (Belgujo)

Sekretario-kasisto: S-ro L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN
(Nederlando), Poŝtkonto 252792.

Redakcio: F-ino Truus Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT (Nederl.)



JARABONO: Ned. guld. 4,50 aŭ egalvaloro, pagebla al jenaj landaj

REPREZENTANTOJ:

Argentino:	S-ro W. Przewolka, Av. Forrest 1404-4 ^o , BUENOS AIRES, 27 pes.
Aŭstralio:	S-ro C. Hickey, P. O. Box 18, MOSMAN N. S. W. 10 sh.
Aŭstrujo:	S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40, p.k. 105.713 30 ŝil.
Belgujo:	S-ro A. de Bosschere, Regentieplaats 3 ST. NIKLAAS-WAAS, p.k. 74260 60 frs.
Brita Imperio:	S-ro N. W. Vigar, Defrene Road 43, SYDENHAM-LONDON SE 26, 7/10
Francujo:	S-ro A. Bessière, 45 Fg. St. Pierre MONTLUÇON (Allier) p.k. Orléans 95-03 420 frs.
Germanujo:	S-ro H. P. Klein, Demrathkamp 28, ESSEN. p.k. 9040, 5,50 DM.
Hispanujo:	S-ro Angel Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA, 50 pes.
Irlando:	S-ro Lorcan O'hUiginn, Ardmore Farmhill Drive, Roebuck, DUBLIN, 7/10
Italujo:	S-ro A. L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA, p.k. 9/16379, 800 lire.
Nederlando:	Kasisto Nederlanda Katoliko, Krugerlaan 195, GOUDA, p.k. 121449 f 4,50
Usono:	S-ro P. Golobic, 875 E. 154 St. CLEVELAND 10 (Ohio) 1,50 dol.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Tiu ĉi anonceto aperas regule en ĉiuj grandaj Esperanto-revuoj. I.K.I. sendas informojn kaj legaĵojn senpage: tio tamen kostas multan monon kaj tial ni ĉiuj devas subteni tiun laboron per mondonacoj aŭ abono je la dumonata gazeto „Vojo, Vero, Vivo”. Abonprezo ned. guld. 1,20 aŭ 6 resp. kup. jare, al niaj reprezentantoj aŭ rekte al I.K.I. p.k. 268507.



ESPERO KATOLIKA

AL NIAJ LEGANTOJ.

Jen denove Decembro, la lasta monato de la jaro, dum kiu la komercistoj kaj fabrikantoj komencas prepari la bilancon pri siaj aferoj kaj ni, kristanoj, pri la stato de niaj animoj. Tiam ankaŭ la Esperantistoj pripensas la farton de nia movado kaj jam faras planojn por la venonta nova jaro.

En tiu sfero ni momente okupu nin pri nia katolika Esperanto-Ligo kaj speciale pri la revuo ESPERO KATOLIKA. Kiel ĝi fartis dum 1953? Ni ne bezonas pentri la kaŭzojn de la malfacilaĵoj kiuj decidigis antaŭ 2 jaroj la estraron, aperigi E.K. en pli simpla formo: vi jam estas sufiĉe informitaj pri tio. Tamen nia legantaro, kvankam tute komprenema, rajte plendis ke la aspekto de la revuo fariĝis tro malriĉa kaj absolute ne alloga por gajni novajn abonantojn. Ni serĉis rimedojn kaj decidis aperigi E.K. ek de Junio en nova vestaĵo esperante, tiamaniere gajni multajn novajn abonantojn kio ne nur ebligus baldaŭan nuligon de la ŝuldoj, sed ankaŭ plivastigon de la enhavo. Nunmomente ni povas disponi pri nur 8 paĝoj + kovrilo monate, kio kaŭzas al ni daŭran kaprompiĝon, ĉar unuflanke ni volonte publikigus ĉiujn, ofte tre interesajn artikolojn, kiujn afablaj kaj helpemaj legantoj ensendas; aliflanke ni volontege donus ankaŭ iom malpli pezan nutraĵon en la formo de rakontoj, anekdotoj, enigmoj ktp. kiun multaj legantoj prave deziras kiel agrablan distraĵon.

Sekve ni nun havas duoblan peton: unue al la ensendintoj de artikoloj por esti paciencaj — ni atenteme konservas kaj certe siatempe lokigos ĉion uzeblan — kaj due al vi ĉiuj: helpu nin varbante kiel eble plej multajn abonantojn! Se ni ĉiuj varbus en ĉi tiu monato po unu nova abonanto (kiu ankaŭ tuj pagos la kotizon por 1954) ni jam ek de la sekvonta numero povus eldoni E.K. en 16 paĝoj + kovrilo. Ne temas pri financa entrepreno kaj ankaŭ ĉiuj funkciuloj kaj kunlaborantoj faras siajn taskojn senpage, nur el idealistaj motivoj, do la kontribuoj ĉiaspecaj de la legantaro revenas al ili mem en la formo de pli bela, pli interesa kaj pli ampleksa revuo.

Certe multaj preferus aboni alian esperanto-gazeton kiu laŭforme kaj laŭenhave estas pli alloga, sed iom da vere katolika idealismo kaj oferemo por la propra afero ebligas ke nia E.K. tiurilate staros baldaŭ sur la sama nivelo kiel la nun pli imponaj revuoj.

Ni ankaŭ atentigu pri la „Tago de la Libroj”, la 15a de Decembro: estas bona kutimo ke ĉiu Esperantisto aĉetu tiuokaze almenaŭ unu Esp. libron. Tio havas multflankan efikon: oni pligrandigas sian konon de propra literaturo; ebligas al eldonistoj aperigi novajn verkojn sen la risko de financa katastrofo pro nevendeblaj stokoj, kaj sekve kuraĝigas niajn diversajn eminentajn verkistojn kaj tradukistojn, disponigi siajn fortojn kaj tempon por la „verda” literaturo. Ni atentigas pri la librolisto aperanta en ĉiu numero de E.K.; nia stoko enhavas almenaŭ la duoblon de la menciitaj titoloj; ni enpresigas la saman liston dum pluraj monatoj por eviti la altajn kostojn de kompilado, sed ni esperas baldaŭ aperigi novan

liston sur la kovrilo de E.K. Vi tamen mendu ĉe ni la verkojn kiujn vi deziras: se ni ne havus ilin en stoko, ni akiros ilin por vi, kondiĉe ke ankoraŭ haveblaj kaj ne konfliktantaj kun la eklezia leĝo koncerne la librojn. Mendante librojn ĉe ni, vi ankaŭ kontribuas al nia kaso kaj sekve al nia revuo, je via propra profito. Kaj ankoraŭ alia afero: en landoj kie ni ankoraŭ ne havas reprezentanton, ni serĉas fervorajn kaj sindonemajn personojn kiuj emas transpreni tiun funkcion. Tamen ne nur niaj reprezentantoj, sed ĉiu abonanto de E.K. estu propagandisto! Finante ni deziras al ĉiuj niaj legantoj belan, feliĉan kaj gracoplenan Kristnaskan Feston! La Krist-Infaneto benu nin kaj alportu al la dividita kaj suferanta homaro unuecon, konsolon kaj pacon!

LA REDAKTORINO



NIA XXVa en AMSTERDAM.

En ĉi tiu numero vi trovos aliĝilon por nia venontjara kongreso, kiu enhavas la provizoran programon, adresojn kaj aliajn sciindaĵojn. Por plifaciligi la laboron de la L.K.K. vi bonvolu anonci vin kiel eble plej baldaŭ. Ni esperas ke tre multaj el niaj membroj kaptos la okazon por ĝui tre interesan kaj agrablan libertempon!



AKADEMIO DE ESPERANTO.

Kiel novaj membroj de la Akademio de Esperanto estas elektitaj la sekvontaj sinjoroj: Prof. S. La Colla, Italujo; D-ro W.J.A. Manders kaj s-ro F. Faulhaber, Nederlando; s-roj Rakuŝa kaj Rotkviĉ, Jugoslavujo; s-ro J. Scherer, Usono; s-ro W. Ellersiek, Germanujo; s-ro Söderberg, Svedujo; s-ro J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj. Ni kore gratulas la novajn Akademianojn kaj deziras al ili multajn jarojn da fruktoplona laboro por nia Movado.



MONDAMPLEKSA AMO.

Okaze de Kunveno de katolikaj Esperantistoj de Rejnlando - Vestfalio, Germanujo, en M. Gladbach en Majo pasinta sac. R. Ernst el Eupen, Belgujo, predikis esperantlingve en la Benediktina Katedralo, kaj i.a. diris: Certe estas belege, ke la sankta Meso de nia esperanta kunveno okazas je la festo de l'trovo de l'sankta Kruco, je la tago kiam ni preĝas en la S. Meso: „Konigu al ĉiuj popoloj ke l'Sinjoro regas de la Kruco”. Tio estas: konigu al ĉiuj popoloj ke la Sinjoro volas superregi la tutan mondon per la amego. La esenco de la mesaĝo de Kristo estas senfina amo. Pro amo la filo de Dio homiĝis, volis naskiĝi en stalo, pro amo Li vivis, preĝis kaj laboris tridek jarojn kaŝita en Nazareto, pro amo Li tramigris Palestinon por prediki sian mesaĝon de l'amo, faris siajn miraklojn, preĝis dum tutaj noktoj, pro amo Li volis esti skurĝata, kronata per dornoj, portis la krucon kaj fine mortis sur la kruco. Pro amo Li vivas ankoraŭ hodiaŭ en niaj tabernakloj kaj donas al ni la misteron de sia korpo kaj sango. Tial la esenco de l'kristaneco estas amo, grandega amo! Tamen la amego ne jam ampleksas la tutan mondon! Estas la tasko de l'apostoloj kaj de ĉiuj kristanoj: esti atestantoj de Kristo, tio estas: esti atestantoj de Lia senfina amego. Tiu tasko estas speciale nia tasko, ĉar Esperanto estas la lingvo de la unueco, la lingvo de l'amo, kiu unuigos ĉiujn popolojn kaj naciojn. Katolika esperantisto sen mond vasta amo estus absurdaĵo kaj

sensencaĵo. Nia tasko estas respondi al malamo per amo kaj al malboneco per boneco.

La unua supozo ĉi tie estas ke ni vivu ĉiam en la graco kaj amikeco de Dio. Tio estas la signo, ke ni vere amas Dion, se ni tenas ĉiujn ordonojn de Dio. Homo en peko estas homo sen Dio: homo sen amo.

Due Kristano, kiu volas bruli je amo ofte ricevu la vivantan amegon, Kriston mem, en la S. Komunio. Per la S. Komunio ni fandiĝas kun Kristo: lia korpo iĝas nia korpo, lia sango iĝas nia sango kaj lia amego estos nia amego. Tria homo, en kiu la dia amo brulas, multe preĝos. Lia tuta vivo iĝas preĝo. Lia laboro kaj sufero estos preĝado. Lia koro ĉiam estas ĉe Dio kaj li ĉiam vivas en dialogo kun Dio.

Vera amo al Dio estas ankaŭ amo al homoj. La vera katolika esperantisto havas mondvastan koron, malfermatan por ĉiuj homoj. Li preĝas kaj suferas en nomo de ĉiuj homoj kaj por ĉiuj homoj. Li volonte aŭskultas aliajn dum tiuj plendas pri siaj suferoj. Se li povas helpi, li helpas, se li ne povas, li donacas almenaŭ sian kompaton kaj preĝon. Li vidas en sia proksimulo Kriston kaj se li povas helpi hodiaŭ nur unu homon, tamen li deziregas helpi en tiu ĉi unu ĉiujn homojn. Kaj Dio, kiu rigardas pli la volon ol la verkon, ĝojegas multe je tia mondvasta amo!



ESPERANTO VIVAS.

Ne-esperantista entrepreno uzas Esperanton. En la sicilia urbo Siracusa la Internacia Asocio por la defendo de la Junulino malfermis du tre komfortajn loĝejojn por la turistinoj en la plej ravplenaj lokoj de la urbo ĉe la mondfame konataj monumentoj: Greka teatro, Romana Forumo, Orelo de Dioniso ktp. Por helpi la eksterlandaninojn oni parolas Esperanton. — Skribu por enkuraĝigi la Entreprenon aŭ por peti informojn al la „Protezione della Giovane presso Quattrocchi”, Via Vittorio Veneto 92, Siracusa (Italujo-Sicilia),

La 6a Aŭstra Esperanto-Kongreso de 22-24 Julio t.j. en Klagenfurt komenciĝis per katolika Diservo. Predikis en Esp. Patro Pius Lenz O. Cap. pri „Nia laboro por la paco”. Dum la solena malfermo salutis la kongreson i.a. kiel reprezentanto de la diocesa episkopo D-ro J. Köstner, lia ĝen. vikara moŝto D-ro Kadrás, kiu ĝojas pri la klopodoj de la esperantistoj kaj deziras al la kongreso benon kaj sukceson kaj precipe, ke per la lingvo alproksimiĝu la koroj.

Esperanto kaj Scienco. La en Japanujo aperanta „Ginma Journal of Medical Sciences” enhavis dekpaĝan disertacion en Esperanto de S. Nishi, emerita profesoro de l'Universitato de Tokio, pri muskolanomaliroj ĉe Japanoj. Ankaŭ en tri aliaj japanaj sciencaj revuoj aperis eltiraĵoj en Esperanto.

La direktoro de Unesko de la UNO sendis s-ron Pierre Lebar kiel observanton al la internacia Esp. Kongreso en Zagreb (Jugoslavujo). S-ro Lebar klarigis i.a. ke li estas treege mirigita pri la bonega efiko kaj la glateco kun kiu la aferoj estas pritraktataj. Li estas konvinkita ke aliaj, plurlingvaj, kongresoj bezonas monaton por fari la laboron kiu nun okazis en semajno. — Ni esperu ke la raporto de s-ro Lebar ne restos sen efiko je la venontjara kunveno de Unesko en Montevideo.

Blindaj Esperantistoj kiuj ĉeestas la Esperanto-Diservon okazantan ĉiun unuan dimanĉon en la franca preĝejo en London, ricevas la tekstojn de la kantoj en brajla skribo.

L A D E C I D O

Kristnaska rakonto.

Laŭlonge de la multaj kanaloj en Amsterdam revas la malnovaj patriciaj domoj pri la pasintaj jarcentoj. La kanaloj restis la samaj, kiel ankaŭ la centoj da volbitaj pontoj transe kaj se oni de sur ŝipeto rigardas antaŭen aŭ malantaŭen, oni kiel ĉiam vidas longan vicon da samformaj arkaĵoj kiuj je ioma distanco ŝajne kovras la kanalon laŭ la tuta longeco per duonronda plafono. Tamen la ŝipetoj multe ŝanĝiĝis laŭforme kaj laŭ enhavo. Centmiloj da homoj, dum la someraj monatoj ŝipveturas tra la kanaloj en vitraj salonoj por rigardi la mirindaĵojn de la malnova komercista urbo. Ankaŭ la tuta ĉirkaŭaĵo estas malsama kaj eĉ la malnovaj domoj mem: anstataŭ de la iomaj riĉegaj komercistaj familioj ili nun estas plej ofte okupataj de oficejoj en kiuj aŭdiĝas la klakado de skribaŝinoj kaj teleksaparatoj, kaj kie telefone parolas la homoj kun nevideblaj personoj.

Kaj la trafiko! La belaj kaleŝoj tirataj de fieraj brilhaŭtaj ĉevaloj ne plu en digna trotado aŭ fajra galopo veturigas la pompvestitajn, perukportantajn gesinjorojn al preĝejo aŭ al balo, sed aŭtomobiloj ĉiuspecaj per kriegantaj trumpetoj impertinente postulas por si tujan liberan vojon en la vivoplena trafiko.


Dum la vintraj vesperoj ne plu regas mistera duonmallumo, sed fortaj elektraj lampoj, multkoloraj, kriegantaj lumreklamiloj kaj hele lumigitaj elmontrejoj de butikoj kaj magazenoj superregas la nokton.

Ankaŭ la homoj ŝanĝiĝis: la gajkoloraj vestaĵoj kaj imponaj perukoj devis cedi al modernaj, pli oportunaj kostumoj kaj frizaĵoj. Tamen, kiel ajn ŝanĝiĝis la eksteraĵo kaj la ideoj de la homoj, iliaj koroj restis kaj ĉiam restados la samaj; emocioj kaj pasioj, amo kaj internaj konfliktoj ludas la saman rolon kiel antaŭ jarcentoj!

Estas nebula vespero du tagojn antaŭ Kristnasko. La elektra lumo nun kvazaŭ tra vualo duonlumigas la stratojn kaj la fortaj arklampoj similas al flavaj lunoj ĉirkaŭataj de larĝa haloo. La nudaj arboj, nigremalsekaj pro la nebulo, malgaje viciĝas laŭlonge de la kanaloj kaj eĉ ne emas speguli sin en la nigraspekta akvo. Tamen la homoj rapidas en densaj amasoj tra la stratoj, gaje babilantaj kaj haltantaj antaŭ la elmontrejoj, eniras la butikojn kaj poste revenas ŝarĝitaj per diversaj pakaĵoj. La vendistoj de pinarboj faras bonan negocon kaj la pinarbaretoj sur la placoj kaj anguloj de stratoj kaj kanaloj rapide maldensiĝas.

La grandkomercisto Karlo Bosma ne estas gaja kaj feliĉa: la profundaj sulkoj en lia fronto atestas pri zorgoplenaj pensoj. Certe, lia komerco marŝas bone, eĉ tre bone, sed terura batalo okazas en lia koro. Li ĵus forlasis sian kontoron kaj sian belan, ĉarman sekretariinon, kiu jam de post monatoj atakadas lian koron kaj ne vane: jam tro ofte li cedis al tiu sireno kaj trompis sian malpli belan, sed bonegan kaj fidelan edzinon, la zorgoplenan patrino de siaj kvar infanoj. Luisa ĵus postulis de li decidon: ŝi ne plu kontentiĝas kun dividita koro, sed deziras ĝin tute; li forlasu sian edzinon kaj prenu Luisan al si aŭ... ŝi tute rompos la rilatojn kun li kaj eĉ informigos lian edzinon pri liaj trompaĵoj! Interne li furiozas pri la impertineco de tiu knabino, kaj lia konscienco pli ol ĉiam antaŭe avertas lin; tamen la pasio forte bolas en lia koro kaj li ne povas decidi al rompo de tiu peka kaj detruiga rilato.

Aliflanke estus tre penige, paroli kun Maria, kiu nenion suspektas; ŝi certe rimarkis plurfoje ke li estas cerbumanta, sed li ĉiam pretekstis komercan priokupitecon, kiu ankaŭ estus la kaŭzo ke li tre ofte ne pasigas la vesperojn hejme.



Amsterdam, Keizersgracht - „Kanal de l'Imperiestro”

Cetere li klopodis konduiti kiel eble plej normale kaj dimanĉe ĉeestadis la Meson kun Maria kaj la plej aĝa filineto Magda. Ne, li certe ne povus suferi scenon kun Maria kaj preferas esti malkuraĝulo: morgaŭvespere li forlasos la hejmon por instali sin en la apartamento kiun li jam luis por Luisa kaj postlasos letereton por Maria, kiu cetere ne bezonos havi financajn zorgojn.

Alveninte hejmen li silente partoprenas la vespermanĝon; Maria bone rimarkas lian neatentemon, sed ne volas ĝeni lin per demandoj. Post la manĝo li eksidas iom en la ombro apud fenestro kaj rigardas eksteren en la homplenan straton, tamen vidante nenion.

La sesjara Magda bone sentas ke paĉjo estas malgaja; ŝi grimpas sur lian genuon kaj karese apogas la blondan kapeton kontraŭ lian bruston. Tamen baldaŭ la aferoj sur la strato kaptas ŝian atenton kaj vole nevole la patro devas respondi ŝiajn infanajn demandojn. Subite ŝi montras al nigrevestita, vualita sinjorino kun eta knabo kiu havas nigran lozanĝon sur la maniko de la surtuto. Magda trovas tion stranga kaj pridemandas la patron. Tiu ĉi senpripense respondas:

„La paĉjo de tiu knabeto mortis; tial la panjo portas funebrajn vestojn kaj la knabo la nigran lozanĝon.”

Magda rigardas sian patron, levas sin kaj plektas siajn brakojn ĉirkaŭ lia kolo, kovras lian vizaĝon per kisoj, frustrante:

„Ho, kiom malfeliĉa mi kaj ni ĉiuj estus se ni perdus nian paĉjon! Mi fervore preĝos al la Jesu-Infaneto por ke nia kara paĉjo ĉiam restu kun ni kaj neniam mortu!”

La simplaj vortoj de la infano trafis la patran koron kiel glavo; en sufokiga ĉirkaŭbrako li kisegas ŝin, tiam subite metas la infanon sur la plankon kaj for-

kuras en la dormĉambron, kie li ĵetas sin laŭte singultante sur la liton. Maria okupas sin kun la bebo en angulo de la dormejo; supozante ke temas pri nerva eksplodo post la tro streĉa laboro de la lastaj monatoj, ŝi ne ĝenas lin dum kelkaj minutoj; tiam ŝi amoplene metas brakon ĉirkaŭ lian ŝultron, levas lian kapon kaj devigas lin trinki kvietigan medikamenton. Tiel ili restas sidantaj sur la litrando, ĝis subite Karlo ekparolas: li rakontas ĉion, severe akuzante sin mem kaj petante pardonon de la edzino. Maria aŭskultas sen interrompo kaj tiam per malgaja sed firma voĉo parolas:

„Karlo, mi pardonas al vi, ne nur pro kristana devo, sed el tuta mia koro. Tamen vi ankaŭ devas peti pardonon al Dio, kontraŭ kiu vi grave pekis. Morgaŭ ni kune iros preĝejen por konfesi kaj postmorgaŭ dum la Kristnaska Noktmeso ni kune komuniigos. La Krist-Infaneto jam aŭskultis la preĝon de nia senkulpa infano kaj certe donos al vi la bezonatajn fortojn. Cetere ni forgesu la aferon kaj neniam plu parolu pri ĝi.”

„Ho, kiel stulta mi estis dezirante interŝanĝi tian trezoron kontraŭ senvalora artaĵo! Morgaŭ mi forsendos tiun Luisan kun kelkmonata salajro kaj mi estas certa ke mi festos tre feliĉan kaj benitan Kristnaskon kun vi kaj niaj infanoj!”

T. D.



DUOBLIGU LA SALAJROJN !

Diversaj mastroj el la hispana ĉefdiocezo Valencia faris antaŭ kelkaj monatoj demandon al la ĉefepiskopo, Dr-o Olaechea, por ekscii ĉu ili kiel katolikoj estas plenumantaj siajn devojn rilate al siaj salajratoj. La episkopo respondis la 15an de Junio 1953 pere de apostola letero prj la justa salajro. Post kiam li instruigis sin de kompetantaj personoj kaj institucioj, la ĉefepiskopo postulis centprocentan plialtigon de la salajroj. La edziĝinta laboristo sen infanoj, kiu nek fumas, nek trinkas vinon (la popoltrinkaĵo de la Hispanoj), ne vizitas kinon aŭ teatron kaj ne faras vojaĝojn, nepre bezonas 42-63 pesetojn tage nur por nutraĵo, vestaĵo kaj loĝaĵo. En Andaluzio tamen la faklaboristo ricevas tage nur 19-25 pesetojn ! La episkopo klarigas sian postulon en sufiĉe severaj esprimoj :

„Ĉu oni povas supozi ke nuntempe la laboristo vere vivas homindan ekzistadon, se li de sia gajno eĉ ne povas aĉeti cigaredon? Se li ne povas trinki vinon, ne povas vidi piedpilkludon aŭ filmon, kaj ne povas fari vojaĝon? Se ni ne volas ke en kristana lando ekzistu tiaj severaj kastoĵoj kiel en Hindujo aŭ eĉ pli severaj; se ni ne volas toleri ke la vivcirkonstancoj de laboristo apenaŭ diferencas de tiuj de sklavo; se ni pretendas scii ion pri frateco inter la homoj, tiam ni nur povas respondi: NE!”

La episkopo konkludas ke la neta familia salajro devas nepre esti 50 pes. tage, ne cendo malpli. „La amo al la proksimulo same kiel la socia justeco postulas tion kaj kiu ne farus sian devon, severe pekus. La mastro kiu ne pagas justan salajron, sendube estas malbona katoliko, grave favorigas la komunismon, kaj estas kulpa se la laboristoj abomenas la religion laŭ kiu li pretekstas vivi. La mastro ne povas liberigi sin de siaj de Dio preskribitaj devoj, eĉ se li kelkfoje ĉiutage vizitus la preĝejon. Neniom helpas al li, se li per sia mono aŭ persona kunlaboro utilas al pastraro kaj religio. Neniom utilas al li, se li malavare disdonas almozojn, ĉar maljustecon kovranta kompatemo tute ne estas kompatemo. Sur li premas la devo ne alĵeti la justan salajron kiel almozon al siaj laboristoj, sed ke li diru al ili ke li simple pagas tion, kio laŭrajte apartenas al ili.”

Antaŭparolo. Ne estas mia intenco skribi en nia revuo pri Esperanto kiel Mondlingvo, ankaŭ ne pri la profitoj, la uzebleco de Esperanto por Komerco kaj Industrio, por Turismo kaj internaciaj Kongresoj, eĉ ne pri la profitoj de eventuala katolika Internacia Ligo, pri kio temis la artikolo en „Il Quotidiano” (Febr.-Marto 1946). En tiu en Romo aperanta ĵurnalo la itala politikisto Migliori tiam pledis por la starigo de kristana socia internacia Ligo, kiu interligos la katolikajn partiojn de ĉiuj landoj. Ankaŭ mi ne volas priparoli la nerefuteblan fakton — spite ĉiujn pretendojn de iaj eminentaj profesoroj, doktoroj kaj kiaj ajn aliaj scienculoj — ke neniue el la 3424 (ne mi nombris ilin, sed scienculoj!) naciaj lingvoj aŭ dialektoj kapablas plenumi la postulojn faratajn al vere internacia lingvo. Ne, ni lasu tion. Kion mi intencas priparoli kun vi, estas io tute alia: temas pri la Internacia Katolika Informejo, rilate al nia propra IKUE-viveco.

I.K.I.: Jen la tri malgrandaj literoj — vere, malgrandaj etuloj. Sed kia signifo, kia grandega laboro estas kaŝitaj en ili! Ĉu ni ĉiuj jam sufiĉe estas konvinkitaj pri la graveco de tiuj 3 literoj por Esperanto? Eble la malnovaj Esperantistoj jam bone informiĝis pri la estiĝo kaj labormaniero de I.K.I. Tamen ankaŭ inter ili, precipe ekster Nederlando, troviĝas multaj katolikaj Esperantistoj kiuj eĉ ne scias ĝian ekziston. Se mi eraras bonvolu tion al mi sciigi, sed ĉu mi foje ne aŭdis, ke iu nekatoliko petis informojn pri I.K.I. ĉe katolika Esperantistoj, kiuj devis konfesi neniam esti aŭdintaj pri tia Informejo? Kaj ke la nekatolikaj Esperantistoj tiulandaj pli bone scipovis informi lin? Ĉu ne hontinde? Kaj do, por plibonigi tiun ĉi mankon en nia kat. esp. edukco, mi intencas ion babilu kun vi pri tiu grava formo de katolika apostoleco, priparoli ĝiajn ekeston kaj kialon, ĝiajn gravecon kaj taskon, ĝian labormanieron kaj ĝian financiĝon, unuvorte: ĝian vivon.

(daŭrigota). E.H.



RECENZOJ

Guy de Maupassant: *La Normandaj Rakontoj*. Trad. Robert Dupuis. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. - Vere mi ne scias kion pleje admiri: la tre varian enhavon de la 19 elstaraj rakontoj, kelkaj terure dramaj, aliaj vigle spritegaj: ĉiuj majstraj karakterpriskriboj; la admirindan stilon de la lerta traduko; la diversajn belegajn, tutpaĝajn fotografaĵojn, el kiuj du multkoloraj, la artajn intertekstajn ilustraĵojn; aŭ la eldonmanieron! Mi nur povas konsili: mendu ĉi tiun trezoron de la Esp. literaturo kaj prijuĝu mem! 211 paĝoj 22¹/₂ × 16 cm. en riĉa, tuttola bindo kun oraj surprisoj kaj tre originala kovrilo reprezentante grandan geografian karton de Normandio kaj dorsflanke multajn fotojn. Havebla ĉe nia Libroservo. Prezo f 11,50. T.D.

J. H. de Sullivan: *La Junaj Detektivoj*. Eld. Esp. Publ. Co. Ltd. Chorleywood, Anglujo. Prezo f 1,10. La enhavo de ĉi tiu rakonto pri kontrabandistoj ne nur estas streĉa por geknaboj 13-14 jaraj, sed eĉ povas interesi plenkreskulojn; speciale komencantoj trovas en ĝi klarstilan kaj plaĉan ekzercmaterialon. Ni varme rekomendas la bonaspektan libreton, kiu estas havebla ĉe nia Libroservo. T.D.

Faktoj pri Norvegujo. 17 × 12½ cM. broŝ. La libro estas Esperanta eldono de jam en pluraj lingvoj aperinta oficiala informbroŝuro pri Norvegujo. Eldonis ĝin Chr. Schibsteds Forlag kaj la taggazeto „Aftenposten” en kunlaboro kun norvega Departemento de Ekstero. En 64 paĝoj la libreto donas en malgrandaj literoj abundon da konkretaj faktoj kaj informoj, laŭ enciklopedia maniero. Ĉiuj aspektoj de la administracia, ekonomia, kultura kaj religia vivo estas tuŝataj. Proks. 80 desegnoj kaj fotoj ornamas kaj klarigas la tekston. Sciante ke 97% de la Norvegoj apartenas al la evangelialutera konfeso, kaj ke inter la 120.000 ne-luteranoj estas nur ± 3000 katolikoj, ni reale ne povas riproĉi ke en la verketo ne estas menciata la katolika hierarkio. Kiel objektivan informon ni trovis la indikon ke inter la privataj hospitaloj troviĝas krom la Ruĝa Kruco, la katolika. La legado de la libreto certe donos emon al pli detala scio pri diversaj temoj. La lando kaj ties popolo certe valoras vian intereson. Inter multaj pli grandaj libroj la broŝuro tre bone reprezentas la voloron de Esperanto. Havebla ĉe nia Libro-Servo. Rrezio: f 1,85. J.***

Ismael Gomes Braga: *Gramatica de Esperanto.* Eld. Coop. Cultural dos Esperantistas Ltda. Rio de Janeiro. Prezo ne indikita. Tiu ĉi lernolibro por la portugala lingvo-teritorio estas bona inaŭguro de nova Esp. eldonejo. Bazita sur la Fundamento de Esperanto ĝi pritraktas la diversajn regulojn kaj prezentas post ĉiu leciono vortliston kaj ekzercaĵojn, kiuj estas grandparte tradukoj de esp. en port. lingvon, tamen, ĉar la libro ankaŭ estas destinata al aŭto-didaktoj, ĝi enhavas ĉiujn tradukojn, tiel ke oni ankaŭ povas ekzerci sin en inversa maniero. Ni gratulas la eldonejon pro la bonaspekta, klarpresita verko kaj deziras grandan sukceson. T.D.***

Belega monata kalendaro „Pro Juventute” 1954 kun 13 nekonataj grandaj fotoj de la 4 nederlandaj princesinoj (klarigaj tekstoj nederlandlingve), estus bonvena donaco de Nederlandanoj al eksterlandaj geamikoj. Ili mendu ĉe la landaj librovendistoj. Por eksterlandanoj nia Libro-Servo volonte helpas. Prezo f 2,75 + afranko.

La Kruco: trimonata multobligita komunikilo katolika por Usono. Plaĉa enhavo, pro propagandaj kialoj parte anglalingva. Redaktoro s-ro P. Golobiĉ, 17724 Grovewood Ave., Cleveland 19, Ohio, U.S.A. Ni kore gratulas kaj deziras grandan sukceson!



L I B R O L I S T O .

*Nur por kleraj plenkreskuloj. Afranko 10 ⁰ / ₀ alkalkulota. Prezoj en ned. guld.	
*Baekelmans, Elektitaj noveloj	f 0,80
J. Baghy, La verda Koro, por progresantoj	- 2,25
* „ Verdaj Donkiĥotoj	- 2,00
P. Bennemann, Miru, pensu, ridu !	tolbind. - 5,40
*Boudier-Bakker, Surprizoj, trad. Tekla Flint, broŝ. f 3,75	„ - 4,50
H. Bulthuis, Idoj de Orfeo, 540 pp. nur bonaspektaj uzitaj ekz.	f 1,90
„ Inferio, romano pri Ameriko	bind. - 2,90
„ La Vila Mano, ilustrita	„ - 3,40
v.d.Cammen, La Geedzeco, 78 pp.	- 0,25
Sac. Carolfi, La Padova Lilio (S. Antonio) ilustr.	- 0,50
„ La Reformanto (S. Francisko de Asisi) ilustr.	- 0,50
„ Preĝareto, la plej gravaj preĝoj, S. Meso ktp	- 0,75
Chesterton, La naiveco de pastro Brown, detektiva	bind. - 3,10
Collodi, Pinokjo, trad. Marchesi	broŝ. f 1,50 bind. - 3,10
Degreef, La radiantanta Lotuso	- 1,25
Delsuno, Formortinta Delsuno, rakontita de li mem! amuza	- 1,25
Dickens, La Batalo de l'Vivo, ilustr.	tolbind. - 1,95
V. Dorno. La Aventuroj de L.R.M. Sultulof la Xa, sprita	- 0,55
*Fr. van Eeden, La malgranda Johano, trad. H. Bulthuis	- 1,20
Eola, La amo en la jaro dekmil, 350 pp.	bind. - 2,85
Edna Ferber, Fanny, trad. B. Fabo.	tolbind. - 3,10
J. Filip sac., Ĉeĥoslovakaj popolkantoj en Esp. k muziknotoj, ilustr.	- 2,25
*Forst de Batt., La mistero de l'Sango (scienca)	- 1,50
W. Fricke, Universala legolibro	- 1,25
Gerstäcker, La Maro, rakontoj el marista vivo	bind. - 2,10
Wilh. Hauff, La Kantistino, trad. Wüster	- 0,45
*A. Hekler, Arthistorio, trad. Kalocsay, 146 fotoj, broŝ. f 7,—	bind. - 8,00
Heroldo, Mozaiko, div. rakontoj kaj skizoj	- 0,30
„ Sub la Signo de l'Espero, rakontoj el Esp. vivo	- 0,30
D.ro Kabe, Unua Legolibro	- 1,25
Kalocsay, La Gramatika karaktero de la Esp. radikoj	- 0,40
„ Dek du poetoj	broŝ. f 2,— bind. - 2,50
*H. Kirk, Taglaboristoj	bind. - 2,90
M. Koenen, La Sunkrono, novelo	- 1,25
*Korolenko, La sonĝo de Makaro, trad. M. Ŝidlovskaja	- 0,40
*Limburg Br., Akbar, orienta romano	lukse bind. - 3,50
Dan Lord S.J., Flirto, 48 pp.	- 0,15
Ign. de Loyola, Spiritaj Ekzercaĵoj	- 0,85
Luycken, Stranga Heredaĵo	bind. - 2,90
„ Pro Iŝtar	tolbind. - 4,50
D.ro Manders, Esperantologio kaj Lingvistiko	- 2,25
*Maxwell, Anstataŭa Edzino	bind. - 2,85
F. Molnár, La Knaboj de Paŭlo-Strato	- 1,20
Montfort, La Mistero de Maria	- 0,55
Müller, Rembrandt, La Magiisto, k. 100 reprod.	bind. - 5,00
*de Musset, La du Amatinoj k. aliaj noveloj	- 1,25

G. Norway, La Aventuroj de Marteno Drake	bind. f 2,75
E. Pizzi, La Floretoj de S. Francisko de Asisi	- 0,70
„ La Protektanto	- 0,25
E. A. Poe, Ses Noveloj	- 0,75
*D-ro Privat, Vivo de Zamenhof	bind. - 3,10
Raimund, La Malŝparulo	- 1,20
Randag C.s.s.R., Ĉu vi sciis tion pri la Framasonismo?	- 0,25
Reitzel, Aventuroj de Malspertulo	- 0,45
Roche S.J., Nia Mesmistero	tolbind. - 0,75
M. Sabbe, Virina Koro	- 0,65
Ŝal. Alejhem, Hebreaj Rakontoj	- 0,75
*Schreiner, Romano pri Afrika Bieno	- 1,50
Shakespeare, Antonio kaj Kleopatra	- 1,50
„ Romeo kaj Julieta	- 1,50
„ La gajaj Edzinoj de Windsor	- 2,00
Sienkiewicz, Noveloj, trad. Lidja Zamenhof	- 0,75
J. Smeehuijzen S.C.J., La Katolika Librelektilo	- 1,50
Storm, Du Majstronoveloj	bind. - 2,10
Stuttard, La Virineto en Bluo	- 2,30
van Sutter, Potenco Infera, pri du demonposedataj infanoj	- 0,75
*Szilagy, Dua Rapsodio, Tria Rapsodio	po - 1,80
*Th Thijssen, La nevenkebla ĝeno	bind. - 4,90
Timmermans, Kristnaska Triptiko, ilustr.	- 0,50
*Turgenjev, Elektitaj noveloj	- 0,75
Uytterdijk, S-ro Longkrurulo, k. 152 bildoj	- 1,25
Vanweddingen, Sub la vitra Kupolo, romano	- 1,25
v. d. Vondel, Jozef en Dotan, biblia tragedio	- 1,25
Wannemakers, Tutmonda Laŭdo, preĝlibro	- 4,85
*H. G. Wells, La Dormanto vekigās	bind. - 3,10
* „ La Tempo-maŝino	- 1,20
Wisemann, Fabiola, il. 445 pp.	bros. f 4,50 lukse bind. - 8,00
Wodehouse, La Princo kaj Betty (humorista)	- 1,20
Zamenhof, Fundamenta Krestomatio,	broŝ. f 5,50, bind. - 7,50
Vortaroj, Plena Vortaro de Esperanto	tolbind. - 11,50
Schidlof. uitgebreid Zakwoordenboek	„ - 2,25
Naŭlingva Etimologia Leksikono, L, Bastien	„ - 7,00
Konversacia Vortaro, ŝerca difino de la vortoj	- 0,20
M. E. Biblioteko, 19 n-roj div. temoj, petu prospekton,	po - 0,35
Bildetoj de S. Ignacio de Loyola kaj de N.S. de ĉiuj Popoloj	po - 0,03
Multkoloroj reprod. de Ned. pentristoj, poŝtkartoj, 11 div.	po - 0,08
Esperanto Insignoj	- 1,00

Tiuj ĉi kaj multaj aliaj titoloj, lernolibroj, esperantaĵoj ktp estas ĉe ni haveblaj.

Mendoj kaj Pagoj: por Nederlando: al f-ino T. Durenkamp, Kasperspad 91, Dordrecht, p.k. 214009. Por aliaj landoj: rekte al ESPERO KATOLIKA, Vleuten, (Ned.) Al la mendo oni aldonu la atestilon, ke la sumo estas pagita al la landa peranto.